Jaro V. Aprilo, 1924. Numero 8

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO: por Bulgarlando 30 levoj, por fremdlando: bonvalutaj 60 lv., malbonvalutaj 40 levoj.

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

АБОНАМЕНТЪ: за България 30 лв. Обявления: кв. см. 2 лева. Отдѣленъ брой 3 50 лева

Препоржчано отъ М-о Н. Пр. за учил. библ. съ окр. № 1870 отъ 27. I. 1922

Unu difekto.

En la lastaj jaroj la Esperanto-movado en nia lando marŝas tre bone — eĉ ofte la rezultoj de nia agado superas niajn atendojn. Certe tio estas ŝuldata al la fervora kaj sistema agado de la bulgaraj esperantistoj.

Tamen, notante tion kaj laŭdante ilian agemecon, ni ne povas preterlasi silente ankaŭ kelkajn difektojn en nia ĝenerala agado, sen kiuj certe la lasta estus multe pli rezultodona.

La afero estas, ke ĉe ni aperas tro multaj iniciativoj kaj mankas sufiĉe da plenumantoj. Kaj pro tio ofte multa energio estas uzata por atingi celon, por kiu la reala bazo ĉe la nunaj cirkonstancoj ne estas ankoraŭ kreita. Tre multaj el la novaj esperantistoj alpaŝas al la agado kun la konvinko, ke la ceteraj, precipe la ĝisnunaj agintoj, ne marŝas laŭ la plej rapide kondukanta al la celo vojo, kaj ili komencas montri novajn metodojn, krei vastajn planojn. Ili mem ne estas tamen pretaj fariĝi plenumantoj de la ĝisnunaj iniciativoj, ili nur deziras, ke la aliaj nepre agu por realigo de iliaj iniciativoj.

Kaj aperas ne tre ĝojiga bildo: multaj kapitanoj, malmultaj soldatoj.

Tio estas karaktera trajto de nia popolo. En ĉiu movado ĉe ni oni povas rimarki la samon.

Antaŭ tri jaroj mia intima amiko R. G. lernis esperanton en kurso, kiun mi gvidis. Post la tria aŭ kvara leciono li akompanis min ĉe la hejmeniro kaj dum pli ol unu horo elmetis al mi sian planon pri vasta propaganda agado. Li prave komprenis ke: „la homoj tre, tre malmulte konas esperanton, kaj estas necesa granda senĉesa propagando. Por tio oni devos . . . " ktp. ktp. sed . . .

Sed . . . mi respondis: „Vidu, kara, ni estas sufiĉe engaĝitaj en la ĝisnunaj iniciativoj. Donante nun la planon, akceptu vi ankaŭ la taskon labori por ĝia realigo." — „Ne, por tio mi ne havas sufiĉe da tempo," li respondis: „min vi lasu . . ."

Tio estas. Kaj kiom da tiaj samideanoj mi renkontis ĝis nun!

En Sofio nune laboras por esperanto kvar organizaĵoj: Sofia sekcio, Poduena sekcio, Studenta grupo kaj Gimnaziana grupo. Ĉiu el ili faras apartajn kunvenojn kaj akceptas gravajn decidojn pri plej vasta propagando. Neniu el ili povas plenumi bone la decidojn: mankas la plenumantoj. Eĉ ofte mankas personoj por plej ordinaraj aferoj: dismeti en la afiŝskatolojn de la Sofia sekcio anoncojn pri kunvenoj, porti al la redakcio de iu ĵurnalo noton pri esperanto, porti dokumentojn en iun Ministrejon, ktp. Ĉar ja ĉiuj estas kapitanoj.

Se tiuj organizitaj samideanoj preferus esti antaŭ ĉio plenumantoj, kaj poste, — post kiam ili kreos novajn plenumantojn — iniciatantoj, tre certe la ĝisnunaj sukcesoj estus trioble pli grandaj.

Nia devo estas, konante tiun difekton, peni forigi ĝin. La amo al nia afero devos igi nin superi niajn malfortecojn, niajn emojn kaj preferojn.

Tion devos kompreni kaj scii ĉiu esperantisto, kiu deziras labori efektive por nia afero. La vojo al kapitaneco pasas tra soldateco.

Ada.

Samideanoj, помнете, че следъ половинъ година ние трѣбва да имаме Esperanto-hejmo!

Заменхофъ въ български преводъ.

Два превода на есперантския химнъ.

LA ESPERO.

У човека ново чувство трепна,
мощенъ зовъ се носи по земята —
на зефира неженъ съсъ крилата
некъ лети той — вредомъ вси да сепне!

Не къмъ кръвожадний мечъ ни вика,
не зове ни той на бой отчаянъ —
на свѣта, де кръвь безспира блика,
миръ свещенъ и братство той вещае!

Подъ свещений знакъ — звезда-надежда
идатъ, идатъ вечъ борцитѣ смѣло —
всѣки бърза, всѣки се нарежда
подъ зелений стягъ на нашто дѣло!

Насъ ограждатъ зидове вѣковни,
вси народи биятъ се въ стенитѣ,
но ще паднатъ рабскитѣ окови
отъ любовь свещена въ прахъ разбити!

На една основа на езика
всички хора ще се разумѣятъ —
вси народи съ миръ ще заживѣятъ
въ братска челядь, братска и велика!

Не ще падне бодъръ духъ въ борбата,
че звезда ни пѫтя освѣтлява,
и накрай великий блѣнъ, о братя,
ще се сбѫдне, вѣчно благославянъ!

София. Превелъ Ив. Добревъ.

НАДЕЖДАТА.

Чувство ново дойде на земята,
Повикъ силенъ днесъ свѣта огласяя,
На зефира леки на крилата
Отъ мѣсто на мѣсто се разнася.

Не къмъ меча, що за кръвь жадува,
Не къмъ разпри тика то човека,
На свѣта, безспирно що воюва,
Сговоръ обещава то до вѣка.

Знаме на надежда се развѣва,
Околъ него се борци сплотяватъ,
Бързо дѣлото расте, успѣва
Чрезъ труда на тѣзъ, що се надѣзатъ.

И днесъ още стоятъ стенитѣ здрави,
Съ кои хората сѫ раздѣлени,
Но ще паднатъ пречкитѣ корави
Отъ любовьта свята повалени.

Възъ основи езиковни, здрави,
Дето всѣки всѣкого разбира,
Единъ крѫгъ семеенъ ще направи
Цѣлото човечество въвъ мира.

Нашитѣ другари съ жаръ младежка
Мирниятъ трудъ нѣма да отчае,
Доръ съ успѣхъ мечтата всечовешка
Се за общо благо увенчае.

Търново. Превелъ Х. Бъчваровъ.

Отъ Esperanto-hejmo зависи въ голѣма степень бѫдащето правилно развитие на нашето дѣло. Да си помогнемъ сами!

AL ŜI.

Mi konas Vin de sorĉa mond' alia,
En kiu naĝas la animoj en mirindaj heloj;
Kaj sole tie vidis mi ebria
Animon vian — perlon pli brilantan ol la steloj!

Kaj kanton Vian aŭdas mi — de lir' sonado;
Superan harmonion el la nevideblaj mondoj;
Al Vi eterna estas mia sopirado;
Kun Vi mi estas ĉiam sur la grandaj maraj ondoj!

Mi scias: ne unua fojo
En nia vivo, malproksime de l' eterna lumo,
Animoj niaj vokas sur krucvojo
Kaj serĉas sin en la vanteco kaj la mondmallumo.

Ho, venu! Jam tre longe mi atendis.
Kaj kisu min, ĉar kiso via donas senmortecon!
Por vi mi ĉiujn mondtrezorojn vendis —
Por gajni vin... Por vi eterne gardos mi l'animpurecon.

Pleven. Sim. M. Simeonov.

Hr. Smirnenski.

NOKTOMEZAJ OMBROJ.

Noktmeze tuj kiam disiĝas ebriaj
l'amasoj de vanta la tagkarnaval',
kaj lunaj envolvas arĝentaj radioj
la urbon dormantan per nuba vual' —
vagula triopo, ni, reĝoj-parioj,
silente vagadas tra strata senlim'.

La nokt' estas freŝa; tra ĝia ombraro
alpaŝas vizioj el stranga revmond',
jen lumas figur' de knabino, de kara,
kaj tuj disverŝiĝas en brust' beatond',
jen ia fantom' en funebra vestaro
pensigas pasintan feliĉon kun tim'.

Ĉar nokte la urb' estas mira legendo,
malĝoja, sed kara — la viv'-iluzi',
kaj ĉiu animo — poemo de l' sento,
kaj ĉiu vers' — amo, sufer', tragedi',
kaj tomba surskribo, kaj sonĝa turmento —
flustrataj de l' nokto al nigra la ter'.

Noktmeze tuj kiam amasoj ebriaj
disiĝas jam lacaj de l' tagkarnaval',
kaj lunaj silente envolvas radioj
la urbon dormantan per nuba vual' —
triope vagadas ni, reĝoj-parioj,
malsobraj pro amo, malĝoj' kaj bier'.

Varna. Trad. Miti.

* * *

Al mi kaj al miaj proksimaj
donacis nur galon la sort' —
ne vivo, sed mort'
regadas en niaj animoj —
ne vivo, sed mort'!

Ni longe suferis infere,
sen rajto, sen pano, sen vest' —
indigna protest'
boligas la sangon kolere —
indigna protest'!

Kaj mi mem kaj miaj proksimaj
batalos por justo sur ter' —
ekregos Liber'
sur niaj kadavroj viktimaj —
ekregos Liber'!

Miti.

.'. R. Slavejkov.

NE KRESKAS IZOLAJ...

Ne kreskas izolaj en kampo la floroj,
Nek izolaj birdoj printempe kantadas,
Malfacilajn tagojn sen amika koro,
Pezan, malesperan vivon mi vivadas...

Kaj vin, mia kara, sensimila floro,
Kun glacia mano vin la morto prenis,
Frue vi foriris, frue malaperis,
Kaj en mia koro restis nur doloro!

Ne kreskas izolaj en kampo la floroj,
Nek izolaj birdoj printempe kantadas,
Malfacilajn tagojn sen amika koro,
Pezan, senesperan vivon mi vivadas!...

Panagjurište. Trad. Doneta.

Mevoj.

Al Eva T.

La suno ekŝvebis en la violkolora polvo de l'okcidento, [..]tante oblikvajn radiojn sur la maron.

Mi vidas super la moviĝema horizonto mevojn, kiuj flugas [..]n vastaj rondoj, etendinte senmove blankajn flugilojn. Ili ekbrilas [..]ubite — lumitaj de radio de la ora suno — kaj malaperas en malproksimo.

Konstante mallumiĝas...

Kaj mia animo estas same unu ĝuema mevo, kiu vage flugas super la ondiĝoj de la vivo — altirata de ili, ĉarmata de ili... unu mevo, kiu sentas senliman plezuron portante sin super la abismoj malfermitaj de kruela uragano, super la abismoj, kiuj faŭkas atendante oferaĵon. Kia deziro — esti tiu oferaĵo! Kia altiro tamen — transflugi la abismon de soifantaj ondegoj kaj kun trankviliĝinta koro, per facile spiranta brusto elkrii:

Kaj tamen — la vivo allogas!

Ho, neniam! La vivo venkis, ĝi foje venkas, sed la fina venko estos tiu de la morto. Kaj tiam la soifanta faŭko de l'ondegoj sin malfermos por engluti la oferaĵon — unu mevon kun rompitaj flugiloj.

Kaj la tempoj forviŝos ĉian postsignon desur ĝiaj vojoj — ĉar multaj venas post ĝi — ĝuemaj, malfeliĉaj mevoj...

Konstante mallumiĝas.

Miti.

Съидейнико, какво отдѣли този месецъ за Esperanto-hejmo?

El „La libro de l'enigmoj"

de Nikolaj Rajnov.

Verda estas la maro, blanka estas ĝia ŝaŭmo, sed ja la akvo estas senigita de koloro.

Kiu trompiĝas: ĉu la maro aŭ vi?

Blua estas la ĉielo, blankaj estas la nuboj, sed ja la aero estas senigita de koloro.

Kiu trompiĝas: ĉu la ĉielo aŭ vi?

Bela estas la virino, amo sonas en ŝia voĉo, sed ja ŝia animo ne estas kredinda.

Kiu trompiĝas: — ĉu la virino aŭ vi?

... Ŝia animo estas liuto, per kiu ludas la viro, la vento aŭ — la rabio.

* * *

La ĉielo ekdemandis la kantiston:

„Vi kantas pri mi kaj pri via amo al mi. Kion vi amas, vere, en mi?"

Kaj la kantisto respondis:

— Mi ne scias, ho ĉielo! Eble mi amas en vi la talion, sed vi ne havas talion!...

Kaj la ĉielo diris malĝoje:

— Ne, mi havas talion. La tero estas mia talio... Sed vi ne amas min: mensogo estas viaj kantoj — kaj vanta sopiro estas viaj versoj...

Kaj la kantisto respondis tiam:

— Vere, ho Ĉielo, mi amas la Teron, ĉar la Tero estas via talio! Ĝin ekamis mi!

. . . La Tero ekdemandis la kantiston:

— Vi kantas pri mi kaj pri via amo al mi. Kion vi amas, vere, en mi?

Kaj la kantisto respondis:

— Mi ne scias, ho Tero! Eble, mi amas en vi la animon, sed vi ne havas animon! . . .

Kaj la Tero respondis malgaje:

— Ne, mi havas animon: la Ĉielo estas mia animo . . . Sed vi ne amas min: trompo estas viaj kantoj — kaj mensogaj ploroj estas viaj versoj . . .

Kaj la kantisto respondis tiam:

— Vere, ho tero! Mi amas la Ĉielon, ĉar la Ĉielo estas via animo! Ĝin ekamis mi!

. . . Plej poste la Virino ekdemandis la kantiston:

— Vi kantas pri mi kaj pri via amo al mi. Vi ploras por mi kaj por via enuo post mi kaj post ĉio mia. Kion vi amas, vere, en mi?

Kaj la kantisto respondis:

— Mi amas en vi la Nokton, ĉar tiam Ĉielo kaj Tero kuniĝas en unu! . .

* * *

Ne depasu mian pordon!

Mi atendas vin en silento dum la tuta vivo. Via parolo estis mia kanto. Via silento estis mia sonĝo. La movo de via mano vekis en mi fantomojn. Sed vi ĉiam depasas min, kaj mia pordo vane malfermiĝas tuj kiam mi vidas vin. Ne depasu mian pordon!

Ne forklinu vian rigardon! Miaj kantoj eĥas post vi kiel sopiroj de maljunaj virinoj, kiuj revenas de entombigo. Tuj kiam la arbaro finis sian kanton, mi malfermas pordon kaj atendas vin. La manĝotablo estas aranĝita, lumiloj verŝas diamantan lumon. Mi atendas vin. Ne forklinu vian rigardon!

Tradukis Palmin.

За Esperanto-hejmo.

Повикътъ ни е чутъ.

Пръвъ се отзова нашиятъ старъ и преданъ съидейникъ г. Георги Атанасовъ, като подари за цельта 40 екземпляра отъ стъкмения и издаденъ отъ него музикаленъ албумъ „Млади пѣвци“ (цена 15 лв. екземпляра).

Желателно е групитѣ да си набавятъ по единъ екз., или да се погрижатъ за разпродаването на подаренитѣ екземпляри — съ това тѣ ще допринесатъ нѣщо за фонда.

Наши съидейници, чиновници въ Сметната палата, непосредствено следъ появата на позива събраха помежду си и внесоха 260 лв. за Esperanto-hejmo.

Ученическата група въ Радомиръ сѫщо изпрати веднага 300 лева за цельта. Сѫщата е избрала комисия, която по списъкъ събира ежемесечно малки вноски отъ членоветѣ си за фонда.

Отъ по-раншни дарения и други постѫпления въ фонда има лв. 2805·10.

Да последваме примера на първитѣ дарители! Всички до единъ да отдѣлимъ по нѣщо!

Нека въ всѣки градъ младитѣ есперантисти организиратъ събирането на помощи, като посещаватъ всѣки месецъ отдѣлнитѣ есперантисти и ги подканватъ.

Половинъ година мисъльта ни да бѫде всецѣло за Esperanto-hejmo.

Ние ще успѣемъ!

Отъ насъ зависи да имаме Esperanto-hejmo. Хиляда есперантисти по десеть лева могатъ да съберать само за единъ месецъ десеть хиляди лева. — Maro estas gutaro!

Klasikaj reprezentadoj en la Greka Teatro en Siracusa (Italio).

Printempe de 1924 okazos en Siracusa (Italio) grandaj klasikaj reprezentadoj. Profesoro Luigi Scatà intencas aranĝi samtempe esperantan kunvenon, por praktike pruvi la uzadon kaj utilon de Esperanto. Estas petataj la gesamideanoj presigi en lokaj ĵurnaloj avertojn kaj sciigojn pri tiuj aranĝoj kaj sendi al la komitato detranĉaĵojn de l' ĵurnaloj, bonvolintaj presigi la sciigojn. En la mondfama kaj belega Siracusa oni ĝuos efektive la majstran ludadon de l' artistoj. Necesajn informojn kaj detalojn oni petu de Profesoro Luigi Scatà, Via Cavour, 43, Siracusa (Italio).

ESPERANTO-MOVADO.

Enlanda.

Sofia. — En la semajna kunveno de sofiaj esperantistoj, kiun ĉeestis ankaŭ multaj el la novaj kursanoj, estis priparolita la demando pri kolekto de mono por Esperanto-hejmo. Oni decidis dividi la urbon je kvin kvartaloj kaj fari adresaron de la esperantistoj en ĉiu kvartalo; samtempe oni elektis kvin samideanojn kiuj ĉiumovate vizitos la samidenojn en sia kvartalo kaj postulos monatan 10-levan pagon por la E. hejmo en daŭro de kvin monatoj.

Inter la samideanoj en la kunveno estis kolektitaj ĉirkaŭ 1000 levoj por la fondo.

Pleven. — La esperantista grupo aranĝis la 6. aprilo matenfeston.

Bjala. — Laŭ la iniciato de la juna samideano Sava Altimirski la 5. aprilo pttm. en la progimnazio parolis pri Esperanto antaŭ lernantoj kaj urbanoj la sekretario de la societo s-o Simeonov. La intereso pri Esperanto estas granda, sed pro manko de gvidantoj la movado estas malvigla. Nun estas malfermota kurso sub la gvidado de s-ino Petranka Jordanova.

Ruse. — La loka grupo tre sukcese laboras kaj bone preparas la proksiman landan kongreson. La intereso inter urbanoj estas granda. La esperantlingvaj salutoj inter la promenantoj tra la stratoj estas tiom oftaj kiom la bulgarlingvaj. La grupo agas ne nur en la urbo, sed ankaŭ en ĝia ĉirkaŭaĵo kaj vekis intereson inter granda nombro de instruistoj en la vilaĝoj. Ĝi dissendis la manifeston de la Pedagogia Konferenco en Ĝenevo al ĉiuj lernejoj en la distrikto. Dum la Pasko proksima okazos regiona esperantista konferenco kaj matenfesto kun partopreno de aktoroj el la Urba teatro, kiuj nun fervore lernas esperanton. La kurso gvidata de s-o St. Uzunov, prezidanto de la grupo, estas tre sukcesa.

Jam 30 samideanoj el Ruse aliĝis la XVI-an en Vieno.

N. Zagora. — La verda propaganda semajno en nia urbo estis tre sukcesa. Ni ĝin malfermis per la urba heroldo kaj multego da afiŝoj. Tiuokaze nia agrabla gasto Gunĉo St. Gunĉev paroladis en la salono de nia teatro antaŭ lernantoj kaj urbanoj je la temo „Esperanto". Korajn dankojn al la sindonema samideano. Granda propagando estis por ni la tri paroladoj, kiujn ni aranĝis. La membroj de la lernanta sekcio plimultiĝis kaj la urbanoj multe priinteresiĝis. En ĉiu hejmo oni trovos esperantaĵojn kaj ĉiufoje en la stratoj oni aŭdas esperantobabilantojn. Multego da broŝuroj ni disvendis kaj ĉiam ni klopodos pri la sukceso de nia karega lingvo. Ĉiam ni parolas pri ĝi kaj „Kiu havas orelojn aŭdu." — Age.

E. Ĝumaja. — Post multaj klopodoj oni sukcesis malfermi kurson ĉe la gimnazio sub gvidado de gimnaziano N. Stoiĉkov kun 40 kursanoj. Regas granda entuziasmo. Anstataŭ la ĝisnuna vicprezidanto de la grupo s-o Bajĉev, kiu eksiĝis propravole, oni elektis s-on N. Stoiĉkov.

Sviŝtov. — La 15. de Marto, sabate vespere la ĉitieaj esperantistoj organizis intiman vesperfeston. Ĉeestis multaj membroj kaj kursanoj. Post kelkaj vortoj pri Esperanto de s-ro Minkov komenciĝis la amuzo per nia himno, plenumita bonege de orkestro. Estis deklamitaj: L a E s p e r o, N i a E s p e r a n t o kaj L o r e l a j en esperanto kaj bulgara lingvo. Estis kelkaj tre interesaj humoraĵoj. La orkestro plenumis kelkajn numerojn. S-ro Gongo-

lov, instruisto, kantis popolajn kantojn. Plej lasta numero estis koncerta desegnado de nia samideano Davidov, kiu faris portreton de nia Majstro. Fine la amuzo estis finita ankaŭ per nia himno.

Unuvorte la vespero bone prosperis. Ĝia sukceso estas ŝuldata precipe al s-roj Minkov, Gongolov kaj Ŝipĉanov, niaj fervoraj samideanoj.

Malfermita kurso por la geurbanoj. La loka gazeto „Sviŝovski Isvestija" tre ofte publikigas priesperantajn novaĵojn kaj artikolojn.

Leskovec. — Fondita grupo. Prez.: Karaivanov; sekr.: At. Tabakov. Malfermita kurso.

Radomir. — La lernanta grupo atingis grandan sukceson, ricevinte la permeson malfermi kurson por lernantoj de la klasoj, kiuj laŭ la leĝo ne lernas la lingvon, nome IV, V kaj VI. La permeson sankciis la Ministerio de l' Popola Instruado.

La grupo elektis trimembran komisionon, kiu kolektos pagojn de la membroj por „Esperanto-hejmo" kaj fiksis specialan kotizon.

Rahovo. — Post la propaganda semajno kaj la bone sukcesinta publika kunveno fondiĝis Esperanto-grupo.

Ŝumen. — La propaganda semajno estis malfermita per publika kunveno en la Militklubo. Parolis s-o I. Silvestriev; lian paroladon sekvis diskutoj, en kiuj partoprenis ankaŭ la direktoro de la knaba gimnazio s-o Taŝev. La agitado afiŝa kaj parola dum la tuta semajno estis vigla. La grupo gajnis kvin novajn membrojn. Multe da libroj kaj gazetoj estis disvenditaj. La samideanoj ĉe renkonto sur la stratoj estas devigataj paroli nur en Esperanto.

La 24. marto la samideanoj en Ŝumen havis la okazon grupe aŭskulti la radio-koncerton kaj paroladon el Praha.

Ŝumena regiono. — La intereso pri Esperanto ĉe la junularo kreskas. En kelkaj urbetoj kiel N o v i - P a z a r, E s k i - Ĝ u m a j a oni vigle laboras. Tie estas fonditaj lernantaj grupoj. El la unua urbo sin dediĉis al Esperanto nia fervora samideano Krstju Ĵelezarov, kiu jam gvidas kurson por geurbanoj kun 16 partoprenantoj. Ŝumena distrikta lernejinspektoro s-o Skopakov permesis al la tiea lernejestraro, ke la kursoj, gvidataj de s-ro Ĵelezarov okazu en la elementa lernejo centra. La inteligenta parto de geurbanoj estas tre interesigita.

En Eski-Ĝumaja dank' al la lernantoj Tafĉiev kaj Kalev, estas organizita la propaganda semajno per afiŝoj. Krom tio aranĝita kurso por lernantoj el la loka gimnazio en la loĝejo de l'ambaŭ lernantoj gvidata laŭ metodo de Edmond Privat. Granda entuziasmo. La prezidanto de grupo „Vekiĝo", s-o Silvestriev, vizitis antaŭ kelkaj tagoj tiun urbon kaj estis invitita ĉeesti unu

lecionon. Tie li donis al la junaj kaj fervoraj batalantoj la necesajn klarigojn pri la malfacilaĵoj en nia lingvo.

Tiel same laboras sisteme kaj fervore niaj samideanoj Petro Georgiev kaj Spas Dobrev en Kemanlar, kie estas eĉ delegito de U. E. A. ankoraŭ de 1923 jaro.

En vilaĝo Kovaĉevec fondiĝis esperanta grupo dank' al la persista agado de s-o Konstantinov, tiea instruisto. Li organizis kurson por instruistoj, lernantoj, oficistoj.

En kelkaj aliaj vilaĝoj, ekzemple Aleksandrovo, kie la direktorino de progimnazio fraŭlino Anastasia Donĉeva ekinteresiĝis pri Esperanto, komenciĝas pli serioza propagando. Ŝi postulis la necesajn lernolibron kaj vortaron.

En vilaĝo Zvezda (Popovsko) lernas Esperanton la instruistino kun sia kolego.

En P o p o v o jam de longe funkcias grupo esperantista kaj estas instruata Esperanto en la lernejo. Gvidanto de l' movado estas nia fervorega pastro Georgo Hristov.

Silvestriev.

Sliven. — Okaze de la propaganda semajno la loka grupo kune kun la lernanta esper. societo aranĝis esperantan matenfeston la 2. marto en salono „Zora". Ĉe plenplena salono kaj nesilentiĝantaj aplaŭdegoj la festo komencis per „himno de bulgaraj esperantistoj" verkita speciale por tiu ĉi okazo de la talenta bulgara muzikverkisto Mihail Todorov kaj plenumita de la orkestro ĉe la knaba gimnazio. En la programo estis ankaŭ referaĵo de samideano K. Kiprilov, gimnazia instruisto, je temo: „La bezono de internacia lingvo kaj Esperanto", kiu vekis intereson kaj aprobon ĉe la ĉeestantoj.

Slivenanoj restis kontentaj konsciinte la neceson kaj la utilon de unu internacia lingvo kaj faros ĉion de ili dependantan por triumfigi esperanton kiel sola internacia lingvo.

Straĵica. — La 2. III. j. k. okazis nia grupjarkunveno. Ĉi lasta aprobis la agadon de ĝisnuna grupestraro. Elektis por prezidanto de la grupo s-ano C. Georgiev. Prokrastis la elekton de sekretario kaj cetera grupestraro. Nur s-ro C. Georgiev subskribos la leterojn, ĝis kiam estos elektita sekretario. Varbitaj 11 novaj membroj, eksiĝis 11.

Vraca. — Rimarkinda estas la entuziasma progreso de nia movado en tiu-ĉi urbo. En la daŭro de kvar monatoj nur la urbanaro jam eksciis kio estas Esperanto kaj kion ĝi celas.

Antaŭe estis obskuro, sed nun fariĝis helo.

Esperanto jam havas siajn defendantojn kaj kontraŭulojn. Tio estas utila por la esperanta propagando.

Oni iras tra la stratoj kaj renkontas aŭ alproksimiĝas al grupeto kie oni arde disputas; pli malproksime grupeto da gelernantoj laŭte sin salutas kaj ĉio estas tiel bone, tiel milde al la koro esperantista. Grandan rolon elludis en la popularigo de Esperanto la blindula vizito kaj la prezentita koncerto, sed la plej

grava kulpulo por la triumfo de nia lingvo en la urbo eble restis kaj estas nia fervora pionirbatalanto Triĉkov, kiu semis, semas kaj ankoraŭ semos konstante. Sub lia lerta gvidado nun ekzistas dua kurso partoprenata ne nur de gelernantoj, sed ankaŭ de juĝistoj, unu inĝeniero, geinstruistoj kaj aliaj.

Dank' al lia agado fondiĝis ankaŭ la grupo „Sukceso", kiu lastatempe fervore agas.

Ekzemple la 6-an de aprilo estis improvizita en la knaba gimnazio tagamuzaĵo kun granda ĝardenfesto, kiu estis bone vizitita precipe de gejunularo. La geurbanaro pasigis kvar horojn en vere esperanta atmosfero kaj fine ĉiuj disiĝis kontentaj kun la firma kredo, ke Esperanto fine triumfos. La verda fajro rapide brulas. La sekvintan tagon la samideano Lazar Rogaĉev en la sama gimnazio referis je temo:

„Je defendo de Esperanto".

Spite la malbonega vetero la parolado estis sufiĉe vizitita kaj estis aŭdita la vorto de la esperantistoj.

Fine okazis interparolado en angla kaj esperanta lingvoj por demonstracii al la ĉeestantoj, ke Esperanto estas pli belsona ol la angla.

Notinda estas ankaŭ la plena helpo montrata ĉiufoje al ni de la lerneja estraro en Vraca, precipe de la ambaŭ direktoroj de la ĉi-tieaj gimnazioj.

La grupo „Sukceso" korege dankas al ili. Imitinda estas ilia ekzemplo.

Sukces-ano.

Gorna Ĝumaja. — Post multaj petoj kaj penadoj estas fondita kun permeso de la direktoro lernanta esperanta grupo el gimnazianoj en VI, VII kaj VIII klasoj. Al la gimnazianoj el IV kaj V klaso la direktoro ne permesas aliĝi al la grupo. La grupo estas nomita „Edmond Privat" kaj havas 30 membrojn. La estraro estas: prez.: V. Nikolov; sekr.: Stefan Vardev; kas.-bibl.: Jurukov; Kontr. komitato: Marko Velev, Kiril Dragomirov kaj f-ino Nadejda Ikonomova.

Adreso: Gelernanta esperantista grupo ĉe la gimnazio.

Dupnica. — La gelernanta societo viglege laboras por nia afero. Lastatempe ekinteresiĝis pri Esperanto ankaŭ la lernantinoj kiuj ĝis nun estis indiferentaj kaj nun la societo havas pli ol 100 geanojn. Malfermita kurso por komencantoj kaj alia por progresintoj, gvidataj de G. Piŝtijski kaj P. Blagoev.

La societo faras grandajn preparojn okaze de la proksima esperantista konferenco en Dupnica.

La 30. marto okazis ekskurso ĝis „Markov kamak" (Ŝtono de Marko) en Rila Montaro kune kun la Lernanta Neŭtrala Abstinenca Societo.

Всѣки излишенъ левъ — за Esperanto-hejmo!

SCIIGOJ — ИЗВЕСТИЯ.

Esperantista Konferenco. — Gejunulara Esperantista Societo „Rila Verda Stelo“ en Dupnica aranĝas esperantistan renkonton inter la esperantistoj en Sudokcidenta Bulgario. La Konferenco okazos en Dupnica je 3, 4. kaj 5. majo. Estas kore invitataj ĉiuj esperantistoj partopreni la konferencon. Detalojn kaj informojn oni petu de Georgi Piŝtijki, Dupnica, str. Policejska 117.

— Новото издание (III) на учебника по Есперанто отъ Ат. Д. Атанасовъ, издание на българското Есперантско Д-во излезе отъ печатъ. Въ сравнение съ първитѣ две издания, настоящето е значително подобрено. Числото на уроцитѣ е намалено отъ 45 на 25 като къмъ всѣки урокъ сж дадени хубави четива, най-вече анекдоти, които създаватъ интересъ при ученето. На края сж дадени три речници: по уроци, есперанто-български и българо-есперантски, съдържащи всички думи, които се срещатъ въ учебника. Цѣлиятъ учебникъ е съ една печатна кола по-голѣмъ отъ досегашнитѣ издания и е отпечатанъ върху по-хубава хартия. Въпреки всичко това цената му е само 18 лв., увеличение съ 2 лв. само въ сравнение съ първитѣ две издания. Дружеството съ това прави значителна жертва, за да набави евтини помагала за изучаването на езика. Новиятъ учебникъ е интересенъ и за старитѣ есперантисти.

За „Esperantio“. — Въ отговоръ на бележката ни въ брой 7. на „В. Е.“, че д-вото не приема абонаменти за сп. „Esperantio“, получихме отъ редакцията на списанието писмо, въ което се изказва недоволство отъ съобщението ни и се съобщава, че „Esperantio“ ще продължава да излиза. Дължимъ да съобщимъ, че помѣстеното въ органа на д-вото съобщение е преди всичко отговоръ на всѣкидневнитѣ запитвания отъ страна на абониранитѣ чрезъ д-вото съмишленици за „Esperantio“, които се интересуватъ за сждбата на внесенитѣ отъ тѣхъ суми и на които ни бѣ невъзможно да отговаряме по отдѣлно. Тамъ се не споменава, че „Esperantio“ престава да сжществува, а се съобщава на интересуващитѣ се, че д-вото не приема абонаменти, до като изпращането на списанието не стане редовно. Получихме излезлия 5. брой отъ „Esperantio“, обаче искаме да видимъ и подобрение въ администрацията му.

Отъ Д-вото.

Въ следния брой ще бждатъ дадени сведения за конгреситѣ въ Русе, Арадъ и Виена. Тѣзи, които запитватъ нека не искатъ отговоръ по отдѣлно, а да почакатъ майския брой на „В. Е.“.

Изпратете си „aligilo“-то въ Русе.

Libroj kaj gazetoj.

Libroj.

K. Balmont — Blanka Cigno (poemo); trad. N. V. Nekrasov; rekomendita de la Esperantista Literatura Asocio. Eldono de „Esperantio", Berlin, Charlottenburg 2, Fach 18. Prezo ne montrita.

Unu el la plej malfacile tradukeblaj nuntempaj rusaj poetoj estas certe Balmont — kiel ja ĉiu modernisto. En la moderna poezio ritmo, sono kaj senco unuiĝas kaj faras muzikon. Kaj tiu muziko estas kreebla nur en la originalo. La tradukoj, en kia ajn lingvo, povus veki ideon pri la originala soneco — neniam tamen transdoni la tutan muzikon kaj vivon, kiuj estas nur unu fojon kreataj, kaj en tiu nura formo plene elsenteblaj.

Entrepreni tradukon de tia poezio estas heroaĵo. Se ĝi ne sukcesos — ĝi estiĝas profanado. Granda risko por tiu, kiu ekkuraĝas alpaŝi... Sed, se li sukcesos, la rekompenco devos esti des pli granda: la konscio, ke li sukcesis doni al la ceteraj ideon pri la valoro de la originalo.

N. V. Nekrasov riskis kaj... li sukcesis, mi kredas. Legu la poemon kaj juĝu mem pri tio. Sed ĝin legu nur tiu, kiu ĝenerale ŝatas kaj povas kompreni modernan poezion — alie la leganto mem profanus!

A.

Eugen Wüster — Die Verhältniswörter des Esperanto. Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel, Berlin und Dresden, 1924. Prezo 1·55 svis. fr.

Eugen Wüster okupas sin per teoria pristudo de tio, kion la praktika uzado de esperanto rezultigas. Liaj studoj havas pure akademian, sciencan karakteron, tial la plimulton de legantoj ili certe ne tre interesigas, tamen por la malmulta kvanto de specialistoj ili havas grandan valoron. Tiajn laboraĵojn, ni havis ankaŭ en antaŭaj jaroj, de iuj membroj de la Esperanta Akademio (vidu en Oficiala Gazeto similajn pristudojn). Tamen Eug. Wüster donis kompletan kaj sciencan direkton kaj metodon al tiaj studoj.

Li kreis la tielnomitan Esperantologion (sistema pristudo de Esperanto kiel lingvo aplikata), kaj siajn studojn li publicis en samnoma rubriko en la unua jaro de la nova serio de Internacia Scienca Revuo.

Aperis ankaŭ la unua volumo de lia kapitala verko „Enciklopedia vortaro esperanto-germana", kaj ankaŭ kelkaj specialaj fakvortaroj.

La recenzata nun libreto prezentas monografion pri la prepozicioj en esperanto. Ĝi estas verkita en germana lingvo. Kiel uzadi la esperantajn prepoziciojn? Se rilatas pri la ordinara uzo de la lingvo en la ĉiutaga vivo, por tio estas bezonaj tre malmultaj reguloj. Se temas tamen pri la kreitaj el tiu uzado lingvaj

profundaĵoj kaj subtileco en la esprimoj — tiu verko certe havas sian signifon. Por la ŝatantoj de esperanto, kiuj serĉas en ĝi lingvon por pli alta kaj subtila arta kreado, certe la studoj de Eug. Wüster estos valora helpilo por funda ekkono de esperanto.

Nikolao Hohlov — La morto de la delegito de UEA, originala komedio en unu akto. Eldono de „Sudslava Esperanto-Servo", Zagreb, 1924. Prezo 0·40 svis. fr.

Amuza komedieto el la vivo de la esperantistoj, kiu povos esti facile prezentata de amatoroj ĉe niaj lokaj cirkonstancoj.

Gazetoj.

Sennacieca Revuo, monata organo de Sennacieca Asocio Tutmonda; redakcio: Paris XI, 24. bul. Beaumarchais; administracio: Leipzig-Stötteritz, Colmstrasse 1, III., R. Lerchner.

Unu el la plej bonaj gazetoj en Esperanto. Ĝi jam ne propagandas la lingvon, sed uzas ĝin en la praktiko por la bezonoj de rondo, kies ekzisto ne dependas de la lingvo: ĝi estas organo de organizaĵo, kiu ekzistas, ĉar ekzistas la vivo. Kiam en ĉiuj medioj de la vivo ni havos tian organon kiel S. R. ni sen troigo povos aserti, ke Esperanto venkis.

La aprilo-maja numero inter alie enhavas artikolojn pri Lenin, artikolon de Lenin k. a.

Literatur-scienca aldono de S. R. aperas en aparta kajero kun tre interesa enhavo en sennaciisma spirito.

Jarabono por Bulgario 75 lv., kun la Literatur-Scienca aldono — 75 % en pli. Д.

НОВИ КНИГИ:

Orseszko — Marta, rakonto . . . . 90.—
Edmont About — La Reĝo de la montoj . . . . . . 70.—
Molière — Georgo Dandin, trad. Zamenhof . . . . . 25.—
Th. Storm — Imenlago. . . . . 15.—
Fr. Pujula-Veljes — La Rompantoj (kvin monologoj) . . 17.—
Tristan Bernard — Angla lingvo sen profesoro . . . . 17.—
Oscar Wilde — Salome . . . . 8.—
Leibnitz — Monadologio . . . . 10.—
Искайте отделенъ брой отъ сп. Esperanto Triumfonta срещу 6·50 лв.; L. Mondo срещу 13 лв.
Доставя *Еспер. Коопер. Сдружение, София,* ул. 6. Септември, 1.

ESPERANTIO

международно богато илюстровано списание само на Есперанто. Лекъ разбираемъ езикъ. Отдѣли: изкуство, литература, наука, спортъ, филателия, хуморъ и пр. Много безплатни приложения.

Абонаментъ 10 броя само за 60 лева.
Редакция: Berlin — Charlottenburg 2, Fach 18.
Абонаменти приема: СТ. ЖИТРОВЪ, В. Търново.

До ....

....

....

Kolektantoj, ĉu vi volas aliĝi al
INTERNACIA-ESPERANTISTA INTERŜANĜOKLUBO „AMIKECO"
por interŝanĝi poŝtmarkojn, pk. il., papermonon ktp. kaj por korespondo kun la tuta mondo. Membroj en pli ol 40 landoj, unua pure esperantista.
Postulu prospekton kontraŭ respondkupono de
F. JACOBI, — Coblenz, Bahnhofstr. 29. — Germanujo.

ПЪЛЕНЪ УЧЕБНИКЪ

по Есперанто съ граматика, упражненія, христоматия и два, еспер.-бълг. и бълг.-еспер. речници. Необходимъ за курсове и самообучение.
Печатанъ въ Германия, отлично брошированъ
само 12 лева.

Andersen: Fabeloj . . . . . . 9·—
Argus: Pro kio, romano . . 60·—
*Balmont: Blanka Cigno, poemo 6·—
Brüggeman: Unua legolibreto . 12·—
— Dua legolibreto . . . 12·—
— Historio de Esperanto . 36·—
— El la mitologio de antikvaj popoloj. . . . . 21·—
Chamiso: Le historio de Petro Schlemil . . . . 30·—
Christaller: Noveloj. . . . . . 30·—
Cehov, Anton: Rakontoj . . 12·—
Ditterle, Prof.: Vendreda Klubo 48·—
Forge: Abismoj, romano . . . 54·—
*Garŝin: Signalo . . . . 8·—
Goethe: Hermano kaj Doroteo 30·—
Grillparzer: La monahejo ĉe Sendomir. . . . . 18·—
Gvidlibro tra Leipzig . . . . . 12·—
*Guto post Guto, unua esper. antologio, la plej belaj versaĵoj originale verkitaj . . . 7·50
*Hamsun, Knut: Rakontoj . . —·—
Hauff, Wilhelm: La almozulino de la Pont des Arts. . . . . 33·—
— La Kantistino . . . . . . 24·—
Heine, Heinrich: Poemoj . . . 21·—
Heitsch: Perfekta Kuiristino. . 9·—
*London, Jack: Hinago. . . 6·—
*Mia Amiko: kolekto de esper. legaĵoj de Zamenhof, Burlet, Kabe, Gogol, Abdul Baha, Selma Lagerlöf, Sigemacu, Turgenew, Elin-Pelin, Rabindranath Tagore k. a. . . . . 7·50
Irving: Skizlibro . . . . 30·—
Japanaj rakontoj . . . . . . 9·—
Jullien, Jean: Instruistino Milner 9·—
*Kuprin: Laŭroj, fabelo . . . 3·—
Niemojewski, A.: Legendoj . . 30 —
Porchat: Sub la neĝo. . . 27·—
Privat, Edmond: Historio de la lingvo Esperanto . . . . 37·50
Puŝkin, Aleks.: Tri noveloj . . 30·—
Raabe: La nigra galerio . . 30·—
Richter: Esperanto Gvidanto 18·—
Romen Roland: Al la forbuĉataj popoloj . . . . . . 6·—
Stamatov: Nuntempaj rakontoj 30·—
Salom-Alehem: Hebrejaj rakontoj . . . . 30·—
*Tolstoj, Lev: Dio unu por ĉiuj 4·—
Vazov: Bulgaraj rakontoj . . 9·—
Zahn, Ernst: La patrino. . 9·—
*Zamenhof, L. L.: Deveno de Esperanto. . . . . 5·—

Всички тия книги, както и международ. богато илюстр. сп. ESPERANTIO на лекъ еспер. екикъ (абонаментъ за 10 броя 60 лв.) доставя
СТ. ХИТРОВЪ — В.-ТЪРНОВО.
Пробенъ брой безплатно.

Redakcia Komitato:
At. D. Atanasov, Pan. At. Kolev
Dimitr Simeonov
Adreso de la redakcio: Sofio (Bulg.), str. 6. Septemvri, 1.

София, — Печатница Б. А. Кожухаровъ — Телефонъ 1984.